Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 23an de novembro 2012, per Skype.

(Protokolo aprobita la 13an de decembro 2012.)

Partoprenis:
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Eli Eriksen Fitjar en Bergen
Ulf Chr. Lunde en Os en Hordaland (prezidis la interkonsiliĝon)
Mario Machlik en Tromsø
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo
Aprobita kun rimarko pri punkto 4. Ni prokrastas punkton 4 pri strategia plano, ĉar la respondeculo, Asbjørn Lindh, ne povas partopreni dum la kunveno.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 1an de novembro 2012
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto Anne Karin Bondhus raportis pri la Skagen-kontoj.
Skagen vekst: 31 631 kr
Skagen høyrente: 62 296 kr

3. Seminario
NEL aranĝos seminarion la 2-an de februaro 2013, per Skajpo. La temo estos: kiel ni alfrontos la novajn defiojn kaj eblecojn, kiujn la nova teĥnologia epoko donas? Kiel ni povus uzi interreton por instruado, reklamado, informado kaj varbado?

4. Strategia plano
Prokrastita, vd. punkton 0.

5. Lingvojaro 2013
Mario Machlik raportis pri sia kontakto kun Inger Johanne Sæterbakk en Språkåret (la Lingva Jaro). Estis tre pozitiva sperto, kaj ni anoncos nian Landan Kongreson en la programaro de Språkåret.

6. Eventualaĵoj
a) Anne Karin Bondhus preparas novajn studplanojn por peti la subtenon de la studasocio.
b) Venontaj interkonsiliĝoj: 13-an de decembro, 24-an de januaro, 21-an de februaro, 15-an de marto, 19-an de aprilo.

La interkonsiliĝo daŭris 19.35–21.00.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 13an de decembro 2012.
Raportis Ingebjørg Rambjør.